# HEJS

## JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO ★ FEDERACIO

REDAKTORO: Sro. J. M.ª SERRANO

Nro. 56 - 1968

Merceria, 7, 3.º - TARRAGONA (Hispanujo)




Arkaĵo BARA

(IIª jarcento) TARRAGONO

# E D I T O R I A L

1968.Bien podríamos denominarlo "Kongresa Jaro".por doble partida.En Madrid el 53 Congreso Universal de U.E.A.En Tarragona,el 24 Congreso de T.E.J.O. Sobre este último quisiéramos llamar la atención a todos los socios de H.E.J.S. y lectores en general de este boletín.

En varias ocasiones se nos ha insistido sobre la falta de participación en anteriores Congresos o reuniones internacionales organizados por T.E.J.O. Pero la distancia que nos separa de los puntos donde se realizan dichas concentraciones, generalmente en centro-europa,y nuestra condición juvenil no nos permiten disponer siempre de la imprescindible suma de dinero para trasladarnos a donde nuestro espíritu quizás ya ha llegado.

Es por este motivo por lo que quisiéramos indicar que examineis vuestras posibilidadesen tomar parte en el 24 Congreso de T.E.J.O.Se nos brinda la ocasión de asistir a un Congreso Internacional servido a domicilio,en el que tendremos la oportunidad de estar en contacto con jóvenes de muy diversas latitudes geográficas e ideológicas,de conocer personalmente a los dirigentes del Movimiento Juvenil Esperantista Mundial y de pasar,en fin,unos alegres días de vacaciones en la Costa Dorada,a escasos kilómetros del centro turístico de Salou.

Vale pues la pena en ir ya pensando en la aistencia al Congreso y hacer los planes pertinentes para que con vuestra participación logremos organizar un Congreso del que todos nos sintamos orgallosos.Recibid desde ahora nuestra más cordial bienvenida

HEJS-estraro

ULTIMO INFORME. Están inscritos al Congreso hasta este momento de redactar el boletín.. 31

-o-o-o-o-o-o-o-

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO -T.E.J.O.

Centra Oficejo: Nieuwe Binnenweg 176.
Rotterdam -2 Nederlano

Historio: TEJO (origina nomo TJO) naskiĝis en Nederlando en 1938,okaze de la 1-a Internacia Junulara Kunveno. Komence ĝiaj membroj estis precipe infanoj,sub gvido de plenkreskuloj,i.a. ges-roj Van Veenendaal, la fondintoj.La dua mondmilito preskaŭ komplete detruis la organizon,kaj ankaŭ post la milito (gvidate de i.a. s-ino E. Burgler-Jezso) ĝi spertis multajn malfacilaĵojn.En 1956 okazis reorganizo;TEJO aliĝis al UEA Universala Esperanto Asocio) kiel ĝia junulara sekcio.

Celoj: Laŭ la statutoj la organizo celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo pere de:

1. disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto inter la junularo.
2. enkonduko de la Internacia Lingvo Esperanto en la lernejojn.
3. praktika utiligo de la Internacia lingvo Esperanto je la servo de la junularo.
4. okazigo de internaciaj junularaj kunvenoj

La organizo estas neŭtrala rilate al nacieco,raso religio,politiko kaj sociaj problemoj.Ĝi rilatas al al ĉiuj organizaĵoj kiuj celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo.

Strukturo: Hodiaŭ TEJO ampleksas preskaŭ 10.000 membroj en ĉ. 50 landoj.La membroj povas esti individuaj aŭ organizitaj en landaj sekcioj (aŭ ambaŭ).Estas sekcioj en Argentino,Aŭstralio,Aŭstrujo.Belgujo,Hungarujo.Britujo,Bulgarujo,Francujo,Germanujo,Hispanujo, Hungarujo,Italujo,Japanujo,Jugoslavio,Madagaskaro,Nederlando,Novzelando,Pollando,Sud-Koreujo,Svedujo,Svisujo,Usono,Kanado. . . . . . . . .

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

. La organizon direktas komitato,kiu enhavas reprezentantojn de landaj sekcioj kaj de aliaj organizaĵoj (ekz. de la Studenta Esp.Ligo STELO)
La Komitato elektas Estraron,kaj Komisionojn por specifaj taskoj (ekz.lernejoj,ekster-eŭropa agado,kontaktoj kun ne-esp.junularaj organizoj,k.t.p.)

Agado: TEJO ĉiujare okazigas sian Internacian Junularan Kongreson,kiun kutime partoprenas pluraj centoj de gejunuloj de 13 ĝis 25 jaroj el la tuta mondo.TEJO. publikigas sian kvaronjaran revuon "Kontakto",kiu pritraktas aferojn de ĝenerala intereso por la junularo.La organizajn aferojn publikigas "La Juna Vivo",antaŭe aparta gazeto de TEJO,nun parto de la Internacia Revuo "Esperanto" de UEA.Individuaj membroj de TEJO profitas ankaŭ ĉiujn servojn de UEA.

Membreco: Individua membro de TEJO ĝis 22-jara pagas 18,75 ned.gld.,kaj ricevas la Jarlibron de UEA,la monatan revuon"Esperanto" kaj la kvaronjaran revuon "Kontakto".Li rajtas uzi ĉiujn la servojn de U.E.A.

Individua membro de 22 -ĝis 25-jara pagas 25 gld. por la samo.

Fina rimarko: Al ĉiu individua lernanto,en-aŭ eksterleneja kurso ni sincere konsilas iel ajn partopreni en la organizita esperantista vivo jam kiel eble plej frue.Ni estas pretaj doni al vi pliajn informojn laŭ via peto.

T.E.J.O

-o-o-o-o-o-o-o-o-

&&&&&&&&&&&&&&&&&&

)o)o)o)o)o)o)o)o)

-o-o-o-o-o-o-o-o-

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

" 24ª INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T.E.J.O "

# T A R R A G O N O

## E M I N E N T A J V I R O J

### P-ro JAIME ARAGAY PUJOLS

La provinco de Tarragono prezentas multe de famaj viroj dum siaj historiaj periodoj.Historiistoj,sciencistoj,literaturistoj,kuracistoj,kies verkoj kaj agadoj transpasis la proprajn landlimojn kaj rekte influis sur la ĝeneralan progreson dank'al la vivanteco de la respektivaj teorioj,sciencaj elementoj aŭ pro la forta idealismo kaj individua sindonemo de la aŭtoroj.

Hodiaŭ,okaze de la 24ª Internacia Junulara Kongreso de TEJO,ni elektos kelkajn el ili kun la celo konstatigi iliajn grandajn meritojn kaj konsekvence,honori kaj omaĝi ilin:

VICENTE GARCIA.-Ĉi-tiu populara kataluna poeto (pastro),kies vulgara alnomo estis "Rector de Vallfogona",akiris senmortan gloron en la historio de la hispana poeziaĵo.Li estis samtempulo kaj intima amiko de Lope de Vega.Li tre famiĝis samtempe pro pluraj kaj diversaj diroj,spritaĵoj,saĝaj rakontoj,kiujn ankoraŭ tradicie la popolo memoras,laŭdas kaj ŝerce komentas.Li naskiĝis en 1583 kaj mortis en 1623.

ANTONIO GIMBERNAT .- Unu el la plej famaj kuracistoj kaj kirurgoj dum la pasintaj jarcentoj.Lia deĵorado kiel katedratiko pri Anatomio en Barcelono estis

tiel sukcesa kaj brilega ke la Registaro komisiis lin por krei la Kirurgian Kolegion "San Carlos" en Madrido.Al liaj kirurgiaj laboroj oni ŝuldas la malkovron de speciala ligamento signita per lia nomo Li naskiĝis en Cambrils en 1734 kaj mortis en 1816.

JOAQUIN GATELL Y FOLCH .-Oni temas pri kultega filologo,vojaĝanto kaj esploristo tra Afriko.Dank´ al lia kuraĝo oni konis multajn teritoriojn de la menciita kontinento ĝis tiam tute nekonataj.La"Geografia Societo" en Madrido publikigis la liston de liaj gravaj kaj riskoplenaj vojaĝoj.Li vidis la unuan lumon en Altafulla en 1826 kaj forlasis la teron en 1879.

EDUARDO SAAVEDRA Y MORAGAS.-Eminenta arkeologo,historiisto,inĝeniero,sociologo kaj profesoro pri lingvo-literaturo-historio arabaj;naskiĝinta en Tarragono en 1829.Oni povas ĝuste taksi liajn eksterordinaraj meritoj pro tio:Pro liaj mirindaj laboroj kaj verkoj,li estis membro de la Reĝaj Akademioj pri la Lingvo,Historio,Matematiko,Fizikaj kaj Naturaj Sciencoj,Moralaj kaj Politikaj kaj Belartoj. Tarragono dediĉis al li grandiozan monumenton .Li forpasis en 1912.

JAIME FERRAN.- La famo de ĉi-tiu bakteriologo estis tiel granda en Hispanujo kiel Eŭropo kaj Ameriko.Pro liaj laboroj pri la profilaktiko de l´ĥolero,li atingis universalan reputacion dank´al malkovro de la kontraŭrabia serumo.Krom tio,li estis la unua evidentiganta ĉiujn fazojn en la evoluado de la mikrobo"baccillus virgula"eltrovita de Koch.Liaj verkoj"La inoculación antirrábica"kaj "Estudios sobre la rabia y su profilaxis" neniam mankas en la biblioteko de kuracisto.Li naskiĝis en Corbera en 1852.

AGUSTIN QUEROL .-Genia skulptisto,aŭtoro de pluraj monumemtoj,portretoj,bareliefoj kaj aliaj diversaj artismaj verkoj ekzistantaj en Hispanujo kaj multaj urboj en Ameriko.Lia ĉizilo estis vere privilegia kaj lia vivo konstanta sukceso en preskaŭ ĉiuj enlanda-eksterlanda Ekspozicioj.Lia naskiĝo okazis en Tortosa en 1863 kaj mortis en Madrido en 1909.

PEDRO MATA .- Kuracisto,politikisto kaj literaturisto kies prestiĝo ankoraŭ daŭras malgraŭ la forpaso de la jaroj.Urbestro en Barcelono,deputito,senatano, provincestro kaj ministro en Madrido kaj rimarkinda katedratiko,li skribis multajn literaturistajn kaj sciencajn verkojn.Lia "Tratado de Medicina y Cirugia legal, teórica y practica" Konsistigas konsultiĝa verkon eĉ por la aktualaj kuracistoj.Li naskiĝis en Reus en 1811 kaj mortis en 1877.

JUAN PRIM Y PRATS.- Jen kuraĝa kaj bravega generalo kies nomo brilas en la militista kaj politika historio en Hispanujo.Ne nur kiel militisto li atingis altan gloron sed ankaŭ kiel politikisto kaj patrioto meritas honoron.Li naskiĝis en Reus en 1814 kaj estis malnoble mortigita en Madrido en 1870.

ANTONIO DE BOFARULL.-Eminenta kaj erudicia historiisto,advokato,ĵurnalisto,literaturisto,dramaŭtoro kaj inspirita poeto naskiĝinta en Reus en 1825 kaj mortis en 1892.Estas citindaj liaj jenaj verkoj: "Historia critica de la gerra de la Independencia";"Roger de Flor " kaj aliaj.

MARIANO FORTUNY.-Tre fama artisto kaj vera stelo en la pentrarto.Liaj belegaj akvareloj kaj akvofortoj forte impresas nian okuloj.Lia neimitebla stilo kaj magia kolorefekto kreis skolon lumigintan per sia genia paletro.Liaj famegaj pentraĵoj "La Vicaría" kaj "Leyendo en el jardín"kaj"Los Pelucones",grandigis sian elstaran reputacion kiel sublima pentristo.Li naskiĝis en Reus en 1838 kaj mortis en Romo en 1874.

JOSE IXART Y MORAGAS.-Li naskiĝis en Tarragono en 1853.Kiel literaturisto li kunlaboradis en la hispanaj publikaĵoj;tradukis la plej gravajn de Schiller kaj Goethe.Ĉar li estis admiranto de la fama pentristo Fortuny,li verkis la koncernan biografion kaj la recenzon de liaj pentraĵoj.Neatendita kaj perfida malsano forprenis lian vivon en 1895.

ANTONIO GAUDI CORNET.-Unu el la plej originalaj kaj revoluciigaj arkitektoj en la mondo estas sendube Gaudí,kies nomo meritas certe privilegian lokon en la historio de l'konstruarto.Kiel arkitekto li atingis universalan famon pro la eksterordinara stilo de siaj verkoj kaŭzantaj ĉarmon kaj fortan emocion kiam oni atente rigardadas la kolosajn konstruaĵojn ellaboritaj de li,artisto de geniaj procedoj,ravaj formoj kaj profunda religieco kiuj intime kombiniĝas por doni plenan unuecon kaj realecon al siaj arkitekturaj projektoj.-Jen liaj ĉefaj verkoj;"Sankta Familio"(Templo);"Monaĥinejo Sta.Teresa";"Palaco Guell";"Parko Guell";domoj Batlló kaj Mila";"Episkopa Palaco"en Astorga."La kaprico"en Comillas.Li naskiĝis en Reus en 1852 kaj mortis pro akcidento en Barcelono en 1926.

PEDRO GUAL VILLALBI.-Estas sciate ke nia biografiato multe vojaĝis dum sia juneco tra la tuta mondo,tio kio liveris al li grandajn konojn kaj tre utilajn ekspertojn pri personoj,landoj k.komercaj aferoj.Tio reprezentis por li firma bazo por liaj estontaj verkoj pri Ekonomio k. krome brila dokumentado por lia instruiga profesio kies katedro konsistigis ĉiam vera lumon por ĉiuj gelernantoj. Li estis tiuaspekte ekzempla k. akurata instruisto kies laborhoraro li skrupule k.skrikte obserbadis ĉiutage.En la socia k. politika kampoj li okupis diversajn postenojn de grava respondeco k. saĝeco ,kiuj rekte influadis sur la hispanan progreson:

Profesoro pri pluraj lernejobjektoj,k.poste Direktoro de la "Barcelona Altlernejo pri Superaj Studoj Komercaj";Prezidanto de l'Ateneo Barcelones",

unu el la plej prestiĝaj societoj en la grafa urbo Barcelono;Ministro k. Prezidanto de l´Hispana Konsilantaro pri Ekonomio dum ok jaroj k. kies transcenda k. intenca agado atingis plenan sukceson.

Krome,li estis ankaŭ sinceran simpatianto de Esperanto.Ĝuste pri tio li akceptis la Prezidantecon de l Barcelonaj Aŭtoritatoj dum la XXIVª Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en la menciita urbo la jaron 1963. Tute same li sendis sian varman aliĝon okaze de la inaŭguro de memarmortabulo en la strato D-ro Zamenhof ,kvartalo Verneda (Barcelono).Li naskiĝis en Tarragono en 1885 kaj mortis en Barcelono la 12-an de januaro 1968

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

=ESTADO DE CUENTAS EJERCICIO 1967

ACTIVO

| | | |
|---|---|---|
| Cotizaciones socios .......... | 5.016 | ptas. |
| Reembolsos .................. | 5.974 | " |
| Prestamo Sr. S. Aragay...... | 4.754 | " |
| Saldo 1966 .................. | 596 | " |
| | Total 16.340 | ptas |

PASIVO

| | | |
|---|---|---|
| Pago Multicopista ......... | 5.754 | ptas. |
| HEJS- Delegación en Barcelo- | 1.450 | " |
| Edición Boletín ......... | 4.850 | " |
| Gastos correspondencia..... | 2.881 | " |
| Gastos reembolsos .......... | 1.200 | " |
| | Total 16.135 | ptas. |

// SALDO EFECTIVO // ................ 2 0 5 ptas.

C

MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Teléf. 230 29 41
BARCELONA

VENDO RETALES

*para falda o pantalón*
*directos de fábrica*

J. Cardellach

C. Salvatierra, 99
TARRASA